# ĈEA-Retkomunikoj 2017/01

Estimata leganto

pasis jam longa tempo, kiam mi dissendis al vi ĈEA-Retkomunikojn. Nun ĈEA-Retkomunikoj revenas en nova formato! Anstataŭ longa retmesaĝo vi nun ricevados pli ofte (plej verŝajne unufoje dum la monato) mallongajn mesaĝojn kun plej freŝaj novaĵoj!

## Plej freŝaj novaĵoj

### Rememoro al IJK Liberec

Aperis nova video pri la 65-a Internacia Junulara Kongreso en Liberec kreita de Varsovia vento. Okaze de tio ni preparis por vi kolekton de kelkaj fotoj de tiu ĉi evento. Kaj ne nur tion, do ni invitas vin por legi novan artikolon en la retejo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

### Videoj pri KAEST ĉe Verda Stacio

Ni invitas vin aŭskulti novajn interesajn muzikajn kaj parolajn programojn de la renaskiĝinta Verda Stacio, elsendanta nun el Ostrava kaj redaktata de Paŭlo Kaščák. Ĉi foje ni ŝatus inviti vin spekti ĉefe videojn de la pasintjara KAEST.

### Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio



Tradicia pinta aranĝo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kun labora traktado, temaj seminarioj kaj programoj ekskursa, kultura kaj amuza. Ĉi-jare ĝi okazos de la 13-a ĝis la 15-a de oktobro en urbo Šternberk, situanta ĉ. 15 km norde de la regiona urbo Olomouc. Vizitu regule paĝon kun informoj.

### Subtenu filmon "Patrino" dum la dua konkurso "Teo kaj Amo"

Nun videblas la filmetoj por la dua konkurso "Teo kaj Amo" ĉe retejo de la konkurso, kaj komenciĝis voĉdonado por la 10 plej ŝatataj filmetoj, bonvolu viziti la paĝojn kaj doni viajn voĉojn. Ankaŭ ĉi-jare konkursas filmo el Ĉeĥio kaj Slovakio! Temas pri la filmo „Patrino". Pli da detaloj legu en sekva artikolo.

## Eventoj



*Ni elektas el la plej proksimaj eventoj, kiuj okazos en Ĉeĥio:*

### 5-a Tosto por Zamĉjo

Festu la JARON DE ZAMENHOF kaj venu partopreni la aranĝeton TOSTO POR ZAMĈJO. La aranĝo okazos la 26-an de marto en Beroun. Detaloj pri la aranĝo ĉi tie.

### Regiona renkontiĝo en Česká Třebová

Okaze de la Zamenhof-jaro estas preparita regiona renkontiĝo je la unua de aprilo. Oni vizitos ankaŭ lokan ZEO-n en la urbo. Se vi volas partopreni la aranĝon, kontaktu sinjorinon Křížková. Faru tion ĝis la 22-a de marto!

### 6-a Tosto por Zamĉjo

Kaze, ke la 26-a de marto ne taŭgas por vi (aŭ la urbo estas tro for por vi), tiam venu la 8-an de aprilo al Lipník nad Bečvou. Detaloj pri la aranĝo ĉi tie.

### Lingva seminario



Se vi volas fari ion por perfektigo de via lingvoscio kaj krom tio ankaŭ ekskursi, ripozi kaj amuziĝi en amikeca medio, ne forgesu pri la tradicia Lingva Seminario, kiu ĉi-foje okazos 23.-28.4.2017 ne en Skokovy, sed tuj post la AEH-Kongreso en agrabla ripozcentro Zámeček en Hodonín u Kunštátu (distrikto Blansko). Pliajn informojn kaj kontakton vi trovos ĉi tie.

Ĉu vi volas aboni ĈEA-Retkomunikojn? Skribu al retkomunikoj@esperanto.cz!